

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Sankta Vespero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Nun la stratoj forlasitas,
 Pace lumas ĉiu dom',²
 Mi promenas kaj meditas,
 Festas hejme ĉiu hom'.

La fenestroj estas pie
 Ornamitaj per ludil',
 Mil infanoj staras tie
 Kaj rigardas en trankvil'.

Kaj mi iras pro migremo
 El la urba muro-rond'.
 Kia brilo, sankta tremo!
 Kia larĝa, kalma mond'!

Super mi de l' steloj brilo,
 El la neĝo ĉirkaŭ mi
 Kvazaŭ levas sin jubilo:
 Gracon donas Di' al ni!

*Traduko de la Germana poemo "Heiliger Abend" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-12-09.*

MR-022-2 / Arg-233-460 (2004-04-23 13:07:52)

²Paca lum' en ĉiu dom',